




starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

KULTURA DOMO
DUKLA PARDUBICE
loko de la 4a Kongreso de ĈEA
19.03-21.03.1982



1982 · 1 · (89)

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila mu-
ntado au sur submuro au sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, aŭtelefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.

PROSPERAN KUNLABORON EN 1982



LA ĜENERALA ASEMBLEO de Unuiĝintaj Nacioj fine de novembro proklamis la jaron 1983 - Internacia Jaro de Komunikado. La Esperanto-movado kiel tuto, kaj UEA specife, pro siaj rilatoj kun la specialigitaj organizaĵoj de UN /Unesko, Ekonomia kaj Socia Konsilio/, povas grave kaj tre signife kontribui al tiu agado de la ĉefa monda organizaĵo. Niaj preparoj por la Internacia Jaro de Komunikado devus okazi dum 1982. Nia kontribuo al la Jaro elstarigu la rolon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel pontolingvo, kiu ebligas rektan, personan kontakton inter miloj kaj miloj da homoj el ĉiuj anguloj de la terglobo. Ni emfazu, ke tian senperan komunikadon povus ĝui la tuta homaro, se la instruado de Esperanto fariĝus ĝenerala kaj tutmonda. Ni atentigu la mondan organizaĵon - kaj pere de ĝi ankaŭ la tutan mondon -, ke komuna internacia lingvo estas por la tutgloba komunikado almenaŭ same esenca kaj same fundamenta kiel la teknikaj kaj ekonomiaj rimedoj.

Per fundaj preparoj en 1982 por la Internacia Jaro de Komunikado ni samtempe pretiĝas por la Jubilea Jaro 1987. La Estaro de UEA konscias, ke en la internacia Esperanto-movado mankas adekvataj strukturoj, kiuj ebligas festi la centjaran jubileon de Esperanto tiel, ke ĝi estu samtempe plene malfermita al la ekstermovadaj instancoj kaj personoj, kaj ke ĝi, aliflanke, garantiu poste la kontinuecon de tiuj agadoj, kiuj montriĝos plej efikaj. Mobilizi ĉiujn movadajn fortojn por kunordigita agado mondskala - tio estas malnova kaj ŝatata revo de la Esperanto-parolantoj. Tia ĝenerala mobilizo almenaŭ parte jam okazis en la pasinteco, sed ni nun scias, ke ĝiaj sekvoj kaj rezultoj mallong-daŭraj kaj ne-esencaj por la Movado mem. Ankaŭ tiam mankis la adekvataj strukturoj por garantii la kontinuecon.

Aliflanke ni ne bezonas kalkulilon por konstati, ke la Esperanto-komunumo disponas pri grandega potencialo ĝuste por mondskala agado kun longdaŭra efiko. Neniu alia neregistara organizaĵo disponas pri tia tutmonda reto de kunlaborantoj kian havas nia Movado. Sed niaj strukturoj en la internacia skalo ne uzas plene tiun potencialon.

Universala Esperanto-Asocio kaj kelkaj ĝiaj landaj asocioj komencis krei komunajn oficejojn, en kiuj ili intime kunlaboras. UEA certe daŭrigos laŭ tiu vojo de la t.n. ekspansio. Provizore tio estas la sola vojo alirebla per niaj rimedoj. Nia deziro estas, ke tiu vojo multfoje krucigu kun la vojoj kaj

direktoj de aliaj internaciaj aŭ regionaj movadaj organizaĵoj. Tiel estiĝos komuna cirkvito de kunlaboro kaj apogo al komunaj ideoj kaj interesoj. Tiel, iom post iom, kreigos ankaŭ tiu strukturo nun mankanta en la internacia Esperanto-movado.

Ni memoru tamen, ke strukturoj emas sendependiĝi, perdi kontakton kun la bazo, kiu kreis ilin, ekkonstrui por si mem, finfine. UEA volas preventi tiun dangeron per la komencita malcentrigo de siaj agado, instancoj, administrado. La graveco, kiun la komitataj komisionoj komencis ludi en la vivo de la Asocio, estas ankaŭ kontribuo al la provoj superi la dangeron, kiun prezentas strukturoj ekzistantaj por si mem.

En tiu rilato leviĝas la problemo de la informfluado. Ni ofte lastatempe diskutis la principojn de nia informado: desupre aŭ desube. Ni emas preteratenti, ke tiu ĝenerala problemo pri la informfluo ekzistas ankaŭ interne de la Esperanto-movado. Niaj strukturoj ne estas konceptitaj por desuba informado aŭ ni tute ne reagas, se tamen okazas la informfluo tiudirekta. La bedaŭrinda sekvo estas, ke unuopuloj kaj lokaj grupoj tute ne plu inklinas al nacia aŭ internacia kunlaboro, sed ili tute memstare kaj izole provas plani kaj agadi.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la fakto, ke la horizontala dimensio de la komunikado interne de la Movado entute mankas aŭ estas tia, ke oni ne rimarkas ĝin. Ne sufiĉas, ke UEA kaj SAT interŝanĝas salutantojn dum siaj kongresoj. Tiuj kongresaj vizitoj devus havi ankaŭ aliajn konsekvencojn. Ili devus utili por la kunordigo de niaj kultura kaj eduka agadoj. Eĉ kiam komitatano aŭ alia funkciulo ĉeestas private, sen specifa komisiono, jarkunveno aŭ renkontiĝo de alia Esperanto-organizaĵo, ankaŭ tio povus kaj devus havi pozitivan sekvon por la informado kaj kunlaboro inter tiu organizaĵo kaj UEA. Ni ĉesu pensi pri tiu absurda timo, ke ĉiu reprezentanto de UEA ĉe SAT kaj inverse signifas, ke la unua perdas sian neutralecon aŭ la dua fariĝas neutrala. Tiu transplantado de iaj ekstermovadaj zorgoj kaj timoj estas tute superflua en la Esperanto-movado. Anstataŭe, ni kunlaboru sur la kampoj kaj pri la ideoj, kiuj estas komunaj al ni ĉiuj. Unu el tiuj multaj komunaj kampoj estas la preparo por konvena kaj kiel eble plej efika prifestado de la Jubilea Jaro 1987, al kiu ni ĉiuj ligas grandajn esperojn pri la plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

Prosporan kunlaboron deziras al vi ĉiuj

Grégoire Maertens

PRIKONGRESAJ INFORMOJ

4-a KONGRESO
DE ĈEĤA
ESPERANTO
ASOCIO
PARDUBICE
19.-21.3.1982

Sinsekve en lastaj numeroj de nia revuo ni informadis vin pri la preparlaboroj por la 4a asocia kongreso. Ĉiufoje dum la kongresaj traktadoj ne temas nur pri laboraj demandoj, pri taksado de pasinta agadperiodo kaj difino de bazaj principoj por cetera konstruo kaj agado de nia organizaĵo, sed ankaŭ pri

societa evento. Ankaŭ ĉi-jare ne estos aliel. Certe okazos interesaj renkontiĝoj, ne mankos ankaŭ altstara kultura programo, la kongreson salutos eksterlandaj gastoj. Same ne mankos bona societa amuzo kun kvalita orkestro el České Budějovice.

Kiu ne aliĝis, bedaŭru! Pri eventualaj restantaj loĝlokoj en studenta hejmo informos vin ankoraŭ la estro de kongresa preparkomitato Karel F r a n c, Sovětské armády 2287, 530 02 Pardubice. Ree ni devas atentigi, ke oni povas certigi nur la loĝigon por ambau noktoj /19.-21.3.'82/. Apartan tranokton el organizaĵaj kialoj oni ne povas certigi.

Por via orientiĝo ni publikigas koncizan programon de kongresaj tagoj:

tago	programo	proks.hor- tempo
vendredo 19.03.	alveturo de delegitoj kaj gastoj, loĝigo kunsido de organiza komitato /nepublikbla/, kunsidoj de komisionoj kaj sekcioj de la asocio vespermanĝo kun oficialaj gastoj literatura programvespero	posttagmeze 16,00-18,00 19,00-20,30 20,30-22,00
sabato 20.03.	inaŭguro de la kongreso kaj bonvenigo de partoprenantoj raportoj pri la agado, elekto de kongresaj komisionoj, proponoj pri statutaj ŝanĝoj kaj kompletigoj, raporto de CKRK salutoj de eksterlandaj gastoj, reprezentanto de la Kulturministerio de ĈSR kaj de ceteraj gastoj el ĈSR daŭrigo de kongresaj traktadoj elekto de nova CK kaj CKRK nepublika kunveno de CK kaj de CKRK societa amuzvespero	9,15- 9,45 9,45-11,45 13,30-14,45 14,45-16,30 16,30-17,15 17,15-18,00 19,30-23,30
dimanco 21.03.	malfermo de traktadoj kaj prezento de nova asocia prezidantaro proklamo de novaj honoraj membroj, transdono de diplomoj kaj distingoj al meritplenaj asociaj membroj diskuto, rimarkoj, voĉdonaj decidoj kaj solena fermo de la kongreso tagmeza paŭzo kunsidoj de komisionoj, sekcioj kaj de la asocia prezidantaro	9,00- 9,30 9,30-10,00 10,00-12,00 12,00-13,00 13,00-14,00

La aprobita listo de kandidatoj por la elekto de Centra komitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de Centra kontrolo kaj revizia komisiono dum la k v a r a kongreso de la asocio, okazan-

ta en la tagoj 19. - 21. 3. 1982 en P a r d u b i c e, Kultur-
domo de ROH-Dukla:

vica n-ro:	n o m o:	jaro de naskiĝo:	proponas loka grupo:
1.	D a d a k Evžen	1935	Stonava
2.	F r a n c Karel	1925	Pardubice
3.	J e r m á ř Jaromír PhDr, CSc	1922	Praha
4.	K a š p a r e c Jaroslav	1948	Praha
5.	K l e m e n t Jaroslav	1935	Karl. Vary
6.	K o č v a r a Drahomír	1929	Ostrava
7.	K o č v a r a Vlastimil, ing.	1936	Opava
8.	K ř i m s k ý Zdenko	1934	Mělník
9.	M a l o v e c Miroslav	1953	Brno
10.	N o v á k Josef	1932	Jablonec n.N.
11.	P a t e r a František	1920	Hořice v P.
12.	P a p í r n í k Stanislav	1939	Č. Budějovice
13.	P i s k František	1919	Třebíč
14.	P o d h r a d s k á Věra	1939	Brno
15.	R ý z n a r Linhart	1921	Svitavy
16.	S i t t a u e r Pavel	1934	Třebíč
17.	Š k o d a Vladimír, MUDr	1953	Brno
18.	T u r k o v á Margit, ing.	1939	Příbram
19.	V o n d r á k o v á Jiřina	1924	Přerov


Kandidataj anstataŭantoj de la CK de ĈEA:

1.	J a n o u š Karel, ing.	1916	Ostrava
2.	J u p o v á Marie	1916	Kladno
3.	M a d z i a Karel	1952	Třinec
4.	S t a n ě k František	1905	Roudnice n.L.
5.	V y c h o d i l Jiří	1940	Praha

Kandidatoj por la Centra kontrolo kaj revizia komisiono:

1.	C h y t i l Ludvík	1929	Přerov
2.	O p l e r o v á Marie	1942	Ostrava
3.	P a t e r a Jiří	1935	Praha
4.	R u s í n Zdeněk, JUDr	1937	Teplice v Č.
5.	T u r k o v á Marie	1915	Plzeň

UEA seminario en Bad Saarow



Kiel konate Universala Esperanto-Asocio laboras laŭ diversaj decidoj de la Komitato kaj de la Estraro por realigi la celojn difinitajn en la statuto. Gravan rolon ludas ĉe tio la Bazaj Laborplanoj.


Dum la Universalaj Kongresoj ĝenerale mankis la tempo pli profunde diskuti pri la plano kaj pri la diversaj bazaj problemoj ligitaj al ĝi. Grava helpo estis aro da tre utilaj intensivaj seminarioj pri unuopaj problemoj de la agado de la esperantistoj, i. a. la seminario de TEJO 16.-21.6.1980 en Strasburgo sub la temo "Internacia komunikado: aplikado de Esperanto", la seminarioj pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko 1978 kaj 1981 en Žilina /ĈSSR/ kaj 1980 en Ústí n.L. /ĈSSR/. Gravan rolon ankaŭ ludis la seminarioj "Sciencaj aspektoj de Esperanto" 1978 en Ahrenshoop /GDR/ kaj Socipolitikaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia movado" 1979 en Bad Saarow /GDR/. Fine de oktobro 1981 30 personoj diskutis en Rotterdam pri informado. Ni citis nur kelkajn ekzemplojn. Dum la diversaj diskutoj dum- kaj eksterkongresaj reliefigis kelkaj gravaj vidpunktoj, i.a. pri la du ĉefaj agadirektoj: 1. prioritata agado inter influhavaj rondoj / ekz. sciencistoj, politikistoj, amasmediuloj k.t.p. /, t.e. la tiel nomita "desuprismo" kaj 2. la prioritata agado inter la amasoj, la disvastigo kaj aplikigo de Esperanto en la lernejoj, t.e. la tiel nomita "desubismo".

Evidentiĝis, ke necesas pli da trankvilaj laborformoj. Por iom helpi al tio Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR ofertis al la Estraro de UEA organizi programseminaron por la Komisiono Planado de la Komitato. Tiu seminario okazis de la 16a ĝis 21a de oktobro 1981. La partoprenintoj diskutis pri la estonta agado de UEA, inter alie tre amplekse pri la agadoj kaj iniciatoj okaze de la 100-a datreveno de la publikigo de Esperanto.

La tuta seminario, kiu okazis en tre neformala, kolegeca, kreiva kaj diskutoplena atmosfero, verŝajne estis indiko pri komenco de nova etapo en la rilatoj inter UEA kaj ties landa asocio en GDR.

D. B.

NATURA FLORO POR MORTA POETO



Kiel ni jam anoncis en Starto 6/81 en lastaj tagoj de la pasinta jaro, la 1-an de decembro 1981, forpasis eminenta esperantisto, tradukisto, poeto kaj verkisto Valdemar Vinař.

Li naskiĝis la 31-an de majo en Kaposvaro en Hungario. Liaj gepatroj estis ĉefoj kaj nur dumvojaĝa hazardo kaŭzis, ke Valdemar surmondiĝis en la hungara lando.

Jam dum siaj studentaj jaroj li surprizadis per sia neordinara poeta kaj verkista talentoj. Fininte siajn studojn li fariĝis redaktoro, pli poste li dediĉis sin plene al tegtra laboro. Li estis aktoro, poste reĝisoro en Liberec, Plzeň kaj fine en Cheb, kie li vivis eĉ pensiumiĝinte.

Esperantisto fariĝis Vinař en la jaro 1949. Li laboris kiel perfekta tradukanto - eldonitaj estis liaj tradukoj de fabeloj far B. Němcová kaj K.J. Erben - kaj kiel same perfekta aŭtoro de originalaĵoj. Ĉefe dum lastaj jaroj de sia vivo pliriĉigis Vinař la esperantan literaturon per signifoplenaj verkoj, por kiuj li gajnis premiojn en la internacia postulema konkursado: en Stokholmo 1980 la duan premion por literaturo pro sia monologa rakonto "La insulo de neresanigeblaj", duan premion en la Literatura konkurso en Zaragoŝa - Hispanio por la historia rakonto "La astronomia horloĝo en Prago", en pola Bydgoszcz dum la Literatura konkurso je temo "La paco" estis premiita lia felietono "Nefinpentrita kato", kaj lasta premio, pri kiu li nur eksciis, sed kies frukton li ne plu povis ĝui, estis la "Natura floro" en la 21-aj Internaciaj Floraj ludoj en Barcelono por lia originala poemo "Edeno retrovota".

Ne sole la Naturan floron, sed ankaŭ la floron de neforgeso sur lian tombon! Kaj dankojn por ĉio - por liaj laboroj kaj amikeco, por lia fervoro, por ĉiuj belaj homaj ecoj, kiuj ĉiam akompanas la nomon de Valdemar Vinař.

ESe

IN MEMORIAM PRI VALDA VINAŘ

Jiří Karen

I

Jam do entombigatas vi
kvazaŭ rozo
en kruĉo
Jen kuŝas vi
simila al kandel'
kiu ektimis bruladon
De ni foriris vi
al eĥoj en ombrojn
En la plumbaj
en terure pezaj botoj
tra senbruo vi marŝas
al plej foraj solejoj
ĉe eternaj pramveturoj

Jam flugile nun vi marŝas
en burnuson de argil'
volvita

Adiaŭ trinkejetoj
Adiaŭ konsilantaroj
Neniam plu...Ĉis nerevido
mia scenej'

Tie plu neniu demandas
pri ajna kialo
Tie ne estas montoj
malaperis abismoj

Jen do entombigatas vi
kvazaŭ rozo en kruĉo
Kvieta dormanto...Ĉeflanke
florkrona anĝelo

II

Sed mortintoj
sciintaj dumvive paroli
eĉ forpasinte batalas mute
nur nun firme enradikitaj
ĉe certa punkto
kaj scias pli bone
kiom valoras la ĵuroj
pri amo kaj dankem'
kiuj leteron skribi
dum vivis vi ankoraŭ
ne kapablis
pro abunda laboro

Por tiu kurta tempo
al ĉiu el ni restanta ankoraŭ
ni sentas nin
garantiuoloj viaj
rigardoj ni
anstataŭ via okulo
Laboros ni anstataŭ via mano
anstataŭ via plumo skribos
Anstataŭ vi
eĉ vinon trinkos ni
jen pro la ŝuldo
kiun ankoraŭ
ne repagis ni
al vi

Esperantigis
Eva Seemannová

ARTA SEKCIO

La decembra vespero de la Arta sekcio de ĈEA okazis ĵaŭde la 10-an de decembro en la klubejo de entrepreno Prodeks en Prago. La vespero estis dediĉita al la angla Esperanto-poetino kaj verkistino Marjorie Boulton.

Poeto Jiří Karen prezentis al la ĉeestantoj - grandparte neesperantistoj - la verkistinon laŭ siaj autobiografiaj notoj. Poste la nova membro de la sekcio, muzikkomponisto O. Maršák, tralegis fragmentojn el du rakontoj de Boulton "La venĝokomitato" kaj "Vespera vizitanto". Ambaŭ rakontojn tradukis en la ĉeĥan Jiří Karen. Fine oni interese diskutis pri la ĵus legitaj tradukoj de la rakontoj de Boulton kaj pri sia verkaro ĝenerale. Tre belaj estis rememoroj de poetino Eli Urbanová

pri M. Boulton. Kun granda ĝimpatio ŝi rakontis pri ilia reciproka korespondado kaj ankaŭ pri iliaj personaj kontaktoj. Urbanová parolis kun Boulton dum la Universala kongreso en Budapeŝto kaj poste estis vizite ĉe ŝi en Anglio.

La vespero estis finita per rememoro pri la Esperanto-verkisto Valdemar Vinař.

/jpa

omaĉe
al

Eli Urbanová



Eli Urbanová, kiu la 8an de februaro ĝisvivis sian vivjubil-leon, estas internacie rekonata aŭtorino de originalaj poemoj, kiun reprezentas du prese eldonitaj poemaroj /Nur tri kolorojn, El subaj fontoj/ kaj ĉ. 100 poemoj aperintaj en diversaj literaturaj revuoj /kelkaj el ili atingis plej altan aprezon en Bel-artaj Konkursoj/.

La fava akcepto de ŝia poemkolekto Nur tri kolorojn /Stafeto 1960/, ĉu de la kompetenta kritikisto ĉu de la poeziema publiko, spronis ŝiajn kreivajn fortojn por konkero de pliaj celoj. Sed la artismajn spirojn frostigis ĉiutagaj vivkondiĉoj, privataj problemoj kaj ŝango de la profesio.

Por kompletigi la portreton de E. Urbanová ni aldonu, ke ŝi estas unu el la fondintoj de la Internacia verkista asocio /1956/ kaj ke ŝi estas depost 1975 anino de juĝkomisiono por Belartaj Konkursoj. Ŝi gvidis multajn kursojn de Esperanto, ankaŭ eksterlande /Barlaston-kolegio, Norda Anglio/.

Al la kara jubileantino ni deziras multajn novajn kreaĵn sukcesojn, daŭran sanon kaj pliajn bonajn rezultojn en ŝia poresperanta agado.

V. Novobilský

Ĉu informado?

Antaŭ nelonge ni legis la Finan raporton pri la Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto. La enhavo de la raporto ne estas tro ĝojiga: relative multaj aliĝas, sed aliaj, preskaŭ samnombraj, foriras: absoluta kresko de la membraro estas neglektebla.

Kiuj estas la kaŭzoj? El ĉiuj indikoj de la kaŭzoj oni sentas, ke la komuna prakaŭzo nomigas neinformiteco de la publiko, eĉ de esperantistoj.

Kial la pozicio de Esperanto en Hungario estas pli favora? Kial multaj intelektuloj entuziasmiĝis por la Internacia lingvo? Certe ekzistas pluraj kaŭzoj, sed almenaŭ grandparte la situacio estas tia pro tio, ke dum jaroj oni serioze informas pri la lingva problemo en Világ és nyelv /La mondo kaj la lingvo/. Tio montras al ni la vojon, sur kiu ni devas ekpaŝi. Ankaŭ ni devas sistemece informadi.

Pritaksante niajn eblojn kaj fortojn, ŝajnas, ke la plej kon-


vena maniero estus, se la unuopaj sekcioj kaj komisionoj informu siajn neesperantistajn partnerojn.

Niaj hungaraj amikoj el Scienca kaj Eldona Centro en Budapeŝto mem proponas, ke la informoj de la Scienca rubriko, publikigitaj en Budapeŝta informilo estu utiligataj por nacilingva informado /vidu BI, 12/81, p.10/.

La rubrikoj junulara, scienca, turisma, fervojista estas jam nun sufiĉe ampleksaj tiel ke oni povas rekte nacilingvigi ilin, eventuale aldonadi enlandaĵn novaĵojn, kaj liveri ilin al la koncernaj lokoj. La unuopaj sekcioj kaj komisionoj pripensu la manieron, kiel utiligi la eblecon de tia centra informado. Certe, ankaŭ alia formo estas ebla. Ĉu venos realigeblaj proponoj?

-jl-

TURISMA MONDO



JUBILEA X-a PRINTEMPA PORPACA MARŜO,

sabate la 24-an de a p r i l o 1982, organizas Esperantista klubo en Jablonec n.N. kun sekva programo:

Distancoj: 35 km - 25 km - junularo 15 km

tra teritorio Jablonec - Rychnov - Frýdštejn - Drábovna - Malá Skála kaj reen al Jablonec n.N.

Starto: Jablonec n.N. Mírové nám. je la 8-a horo - antaŭ urbo-domo.

Prezentiĝo, aliĝiloj: Kulturcentro Jablonec, strato Jiráskova, ekspozicia salono, 7-a horo. Pli multnombrajn grupojn ni petas sendi almenaŭ proksimuman liston.

Kotizo: 5,-Kčs, infanoj 2,-Kčs

Itinero: ricevos ĉiuj partoprenantoj kun skizo kaj postenoj de kontrolo ĉe prezentiĝo.

Diplomoj, memorinsignoj: ricevos ĉiuj partoprenantoj post reveno en la salono de Kulturcentro strato Jiráskova.

Apartaj premioj estas destinitaj laŭ tradicio por plej multnombraj grupoj, plej junaj, plej agaj kaj plej malproksimaj partoprenantoj el CSSR kaj eksterlando.


Amika vespero kun eksterlandaj gastoj kaj geklubanoj el aliaj ĉeĥoslovakaj lokoj okazos post la marŝo s a b a t e 24.4. je la 19,30-a horo en la klubejo de Kulturcentro.

Tranoktado 24.4. eventuale jam 23.4. ni prizorgos laŭvice en tranokteto aŭ en hotelo...

Adreso: ESPERANTO, poŝt.př. 190 466-21 J a b l o n e c n.N.

JUBILEJNÍ /třicátý/ LETNÍ ESPERANTSKÝ TÁBOR V LANČOVĚ

Klub esperantistů /MS ČES/ v Třebíči a komise mládeže ČES uspořádá již po třicáté Letní esperantský tábor v Lančově



Chemika
OBCHODNÝ PODNIK
BRATISLAVA

- AČETO KAJ VENDO DE PRODUKTOJ DE KEMIA INDUSTRIO
- AČETO KAJ VENDO DE TEKNIKAJ GAZOJ
- PROPRA PRODUKTO POR KONSUMANTOJ KAJ ERA PAKADO DE KEMIINDUSTRIAJ PRODUKTOJ
- VENDADO DE KEMIINDUSTRIAJ PRODUKTOJ PERE DE PODETALAJ VENDEJOJ



Chemika
OBCHODNÝ PODNIK
BRATISLAVA

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANČ-PRODUKTOJ
Kuirejaj kaj viandistaj trančiloj ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kuireja prilaboro de kortbirdoj higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto
Fabrikas KDS SEDLČANY
ČSSR
Eksportas MERKURIA
Praha



JEDNOTA
spotřební družstvo
KOLÍN

Vás zve do nově otevřeného obchodního domu a hotelu
RACEK v Týnci nad Labem

Nova vendejdomo kaj hotelo RACEK en urbo Týnec ĉe Labo
vin invitas

Moderní prodejní prostory tohoto družstevního obchodního domu Vám umožní rychlý a pohodlný nákup.
Pracovníci jednotlivých prodejních oddělení jsou připraveni Vám poradit a nabídnout zboží z velkého výběru.

RESTAURACE //rychlé občerstvení/ /teplá jídla po celý den/ /Kutnohorské pivo/ /příležitostné hostiny/
HOTEL //ubytování ve dvou a vícelůžkových pokojích/ /parkoviště/

JSME PŘIPRAVENI VÁM POSLOUŽIT A TĚŠÍME SE NA VAŠI NÁVŠTĚVU

RACEK
Týnec nad Labem

ve třech bězích: I. 4.7.- 17.7.'82, II. 18.7.- 31.7.'82 a III. 1.8.- 14.8.'82.

Vyučovat se bude denně 4 hodiny, zpěvu 1 hodinu. Odpoledne koupání, sport a vycházky, večer táboračky a besedy.

Každý z účastníků je povinen navštěvovat některý z kursů:

- A pro začátečníky, B pro pokročilé, C konverzační,
D pro budoucí učitele esperanta, E překladatelský, pro absolventy C,D kursů

V programu každého běhu je celodenní výlet s prohlídkou zámku v Jaroměřicích nad Rokytnou, muzea Otakara Březiny, památníku teroru v Babicích, památníku dr.Bedřicha Václavka v Časlavicích, jedinečného stavitelského skvostu ve střední Evropě - basiliky v Třebíči, rodného domu dr.Bohumíra Šmerala v Třebíči, zámku v Náměšti nad Oslavou, známého výstavou goblenů, památníku slavné Bible kralické v Kralicích, přehrady v dalešicích a výlety na zámek Vranov a hrad Bítov.

Přihláška je platná až po složení zálohy nejméně 300 Kčs složenkou na účet Klubu esperantistů, MS ČES v Třebíči u St.spořitelny č.úctu 6006145-718.Složenku po obdržení přihlášky pořadatel zašle.

Všechny informace na požádání zašle: Klub esperantistů, místní skupina Českého esperantského svazu
6 7 4 0 1 T ř e b í č

INTER
BULGARAJ
GEAMIKOJ
SUR LA INSULO
ESPERANTO



Mallarĝrela trajno veturigis min somere al regiono en la plej norda parto de Bulgario.Tien en la limurbon nomiĝanta Orjaĥovo kondukis mia longa vojaĝo.

Mi volis viziti insulon, kies nomo estas Esperanto kaj pri kiu mi tiel multe aŭdis.

Sur la loka stacidomo atendis min grandega surprizo. Kelkaj deĝoj da geesperantistoj bonvenigis min per pano kaj salo lau malnova kutimo kaj premis amike mian manon.

Mi travivis ĉi tie du neforgeseblajn tagojn estante ilia gastoj. Kun ili mi vizitis ĉiujn memoraĵojn kaj kompreneble ankaŭ la insulon Esperanto, kiu situas meze de Danubo.

Belegan vesperon plena de amikeco, kiun aranĝis je mia honoro lokaj geesperantistoj, neniam mi forgesos.

Jaroslav Polenský

RONDETA VIVO

ČESKÁ TŘEBOVÁ - LG realigis ekspozicion en kultura ĉambro de stacidomo ČSD en Česká Třebová. La ekspozicio estis dividita je 10 grandaj ekspozicio-kadroj, kiuj montris historion de Esp. kun rara materialo el j.1920, historion de E-movado en Č.Tř. ĝis nuntempo.Allogaj estis E-gazetoj el tuta mondo,afrankitaj kovertoj kaj bildkartoj. Substrekitaj estis signifo de E.por tutmonda paco kaj internacia amikeco. La ekspozicio montris gravan signifon de E.por nuntempa vivo.

Jiří Pištora

PŘÍBOR-esper.rondeto kunvenadas regule ĉiuĵaŭde en Kulturdomo, str.Lidická.Aŭtune '81 estis fondita EG de junularo,gvidantino M.Drdová. Du anoj de la rondeto estas anoj de Distrikta packomitato en Nový Jičín.

Infanan esper.rondeton "Interklubo" de pioniroj en Baza lernejo str.Jičínská gvidas instr.Libuše Klauďová.Nunjare denove estas en nomita lernejo pionira E-rondeto "Interklubo"en kadro de pioniroj.

Ant.Sattek

ÚSTÍ n.Labem-esper.rondeto ĉe la Kulturdomo ODKP aranĝis la 10-an de dec.'81 sian kutiman monatkunvenon kiel jarfinan feston kaj omaĝon al la 122-a datreveno de naskiĝtago de d-ro L.Zamenhof. Kunvenis ĉ.30 membroj kaj gastoj el urboj Teplice,Most,Děčín,Ostrov n.O. k.a.por hejmeca kunestado.Pri la personeco de d-ro Zamenhof,pri la tago de Esperanta libro parolis J.Kořínek kaj doc.d-ro Vl.Novobilský donis

plurajn priaferajn informojn. En la programo kantis Mir.Smyčka kantojn en Esperantaj tradukoj kun akompano de muzikprofesoro Šebek.La etosor ĉarmigis komuna kantado de ĉefaj popolaj koledoj /Kristnaska pastoraloj/ en Esperanta traduko.

JK

ZNOJMO - EK Znojmo aranĝis la 17.12.'81 tre sukcesan solenan vesperon omaĝe al d-ro L.L.Zamenhof. Festparolanto V. Rotrekl. Bone impresis ekspozicio de E. libroj kaj gazetoj.

V.R.

STONAVA - Výstavu"60 let esperantského hnutí", kterou uspořádala místní skupina ve Stonevě, splnila nečekaně svoje poslání. Během tří dnů zhlédlo výstavu 180 občanů, z toho skoro polovina, což je velmi potěšitelné, byly děti obou škol. Účastníci s velkým zájmem si prohlíželi korespondenci, kterou nashládali veteráni esperantského hnutí za půl století.Ale i sběratelé si přišli na své. Prodalo se mnoho odznaků,pohlednic a suvenýrů.

Jsem přesvědčení, že výstava posílí zájem o esperantské hnutí na Karvinskou.

E. Dedek.

HAVÍŘOV - La postferia agado estis malfermita per la kurso por komencantoj. Dum la Monato de Ĉs-sovetia amiketo estis dediĉita unu vespero al rakontado kun diapositivo pri Moskvo, la 10an de decembro rememoris prof. Pastrňák la naskiĝdeton de d-ro Zamenhof.

A. Staňura

Písek - La 24an de aprilo 1982 okazos en Písek jam 17a reprizo de amasa bonhumora turisma marŝo "Kvindeko de ŠVEJK ". Lasten jaron unusfoje venis kun 5000 da interesuloj ankaŭ

gastoj el eksterlando. Ili estis varbitaj pere de Esperanto. Post la marso vespere atendas ilin kultura programo en Esperanto. Dimenŝe la 25an de aprilo ni ekskursos el lokoj,

kie vivis la verkisto de Svejks Jaroslav Hašek. La organizantoj vin informos. Invitu viajn ĝemikojn. Skribu kaj aligu al la E-o rondeto "La ponto", Kultura klubo JITEK, 387 11 Písek. L. Krivánek

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Pro la misŝanĝo de la paĝoj en Starto 5/81 ni pardonpetas ĉiujn niajn legantojn. Certe vi mem ekvidis, ke la teksto sur la paĝo 6 apartenis al la paĝo 31 kaj inverse. La eraron kaŭzis la preŝejo. Pro granda malfruigo en la presado ni ne povis en la tempo disponebla por la lasta numero normale forigi la erarojn en teksto. Pro tio ni petas senkulpigon.

Kiel ĉiujare junulara komisiono kaj pedagogia sekcio de ĈEA petas ĉiujn gvidantojn de infanaĵ kaj junularaĵ grupoj de Esp. alsendi nomliston de siaj membroj kun indiko de aĝo /ne forgesu por la infanoj pri diplometoj/. Sendadreso: Miroslav MALOVEC, Charkovská 7, 625 00 Brno. La resumojn ni eluzos por plua laboro kun infanoj kaj junularo.

Unika muzea kolekto. Jan Tichon en Bojkovice fordonas sin jam pli ol 50 jarojn al interesa laboro - Esperanto. Sian riĉajn kolektojn pri tiu ĉi fako li donacis al sia urbo kaj post renovigo de la kastelo Nový Světlav ili estos instalitaj en memstara ekspozicio. La urbo Bojkovice tiel akiros ekspozicion, kiun posedas neniuj muzeoj en nia respubliko.

/Koncize laŭ "Slovácká Jiskra" 30.12.'81. - jm/

Pionira aĝo. Rondeto de internacia amikeco kaj porpaca aktivado estis oficiale fondita en la Pedagogia fakultato en Ústí nL. En la kvinjara agadplano estas ankaŭ kurso de Esperanto. Gvidas ĝin doc. V. Novobilský. La partopreno de studentoj estos registrata en ilia indekso de prelegoj.

jm

A P E R I S - eksterordinara kajero de kultura almanako Parnoramo pri la Eli Urbanová. La libro estas presita sur bone papero formato A5, enhavas 95 paĝojn de ĉarmaj siaj poemoj plenplenaj de la sento, amo kaj viva saĝeco. Neforgesu ĝin tuj mendi. La prezo restas 16,- Kčs aŭ 4.- gld.

PRO LA NE ATENDITA drasta ŝparo de komenco de tiu ĉi jaro en ĉiuj direktoj estis ne permesita elŝpezo de la valutoj por nia, jam preparita, karavano al 67a UK en Antverpeno. Ni pardonpetas ĉiujn - sed ... kion fari...

STARTO n-ro 1/82 estas la lasta kiun povas ricevi tiuj, kiuj ĝis nun ne pagis sian asocian kotizon. Do ne forgesu kaj mem sendu kotizon laŭ asocia kotizotabelo rekte al asocia adreso.

Krucenigmo

Ĝusta solvo de la eldiro de la krucenigmo en Starto 5/81 estis: FELIČA ESTAS TIU, KIU TROVIS FELIČON EN SIA FAMILIO.

La premion ricevas: D-ro František Nosek-Praha, Stanislav Babíček-Zdík, Ludvík Zaoral-Olomouc kaj Šárka Vojtášová-Jablonec n. Nisou.

La moto de la krucenigmo en Starto 6/81 estis: 1 RUDENTA VIRO NE KOMENCAS SENPREPARE PAROLDUELON KUN VIRINO.

La premion ricevas: Eva Kánská-Hradec Králové, inĝ. Vl. Ondryáš-Přerov, Marie Vojáčková-Hradec Králové, K. Blažek-Mnichovo Hradiště.

Ĉiuj gajnintoj ricevos novan poemkolekton de Eli Urbanová: EL SUBAJ FONTOJ.


Al ĉiuj solvemuloj ni anoncas, ke en 1982 ni komencas publikigi alispecan konkurson - RESPONDU DEKFOJE! La respondojn je la publikigitaj demandoj sendu al nia redakcia adreso. Ni rekomencos ĉiam minimume 3 ĝustajn respondintojn. Ni supozas, ke la konkurso helpas plialtigi ĝeneralajn sciojn pri nia movado.

Ĉiuj, kies respondoj je demandoj 1 - 6/82 /do tuta jarkolekto/, estos ĝustaj, partoprenos finan lotumadon /kroman/. Feliĉa gajninto ricevos nian specialan premion pro la persistemo.

NIA KONKURSO RESPONDU 10X

1. Kiam kaj kie naskiĝis L. Zamenhof?
2. Kiam kaj kie aperis la unua Esperanto-lernolibro?
3. Kie kaj kiam estis fondita la unua E-grupo. Kiu ĝin organizis?
4. Kiel deĉifri mallongigojn UEA, MEM, TEJO, IFEF, ĈEA, ASE, AESSR?
5. Kiam kaj kie okazis la unua kongreso de esperantistoj?
6. Kiuj estis aŭtoroj de la "Plena gramatiko de Esperanto"?
7. Kiom da E-libroj aperis dum unua jaro post eldono de la unua E-lernolibro?
8. Indiku la daton /tagon, monaton kaj jaron/ kaj urbon, en kiu fondiĝis ĈEA.
9. En kiu jaro verda stelo fariĝis simbolo de Esperanto?
10. De kiam oni povas uzi Esperanton en telegrafio?

Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



Redaktas: V. Novobilský, Školní 5, CS-400 01 Ústí nad Labem

SAEST '82 /Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko/ kiel ni jam informis, okazos semajnfine 1982-08 - 13/15 en České Budějovice, ĈSSR, kaj traktos la ĉeftemon "Energio - la tutmonda problemo". Krome laboros sekcio dediĉita al problemoj de fakaj terminologio kaj traduko. Informojn petu de ĈEA, Jilská 10, CS-110 00 Praha.

Telegrafstilo el la jar-raporto de STS de ĈEA

La sekcio estis gvidata en 1981 de 5 membra komitato. ĈEA subtenis la sekcion finance.

Membroj de la sekcio prezentis 7 prelegojn en Žilina dum AEST '81. En Budapeŝto prelegis ing. Z. Polák kaj ing. J. Vo-jáček.

Informaj artikoloj nacilingvaj pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko aperis en Sdŝlovaci teknika 2/81, Automatizace 3/81, Životné prostredie 3/81 kaj Průboj 1981-09-16.

Informajn prelegojn pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko prezentis en siaj E-klubo ing. Pluhař, ing. J. Vo-jáček kaj doc. V. Novobilský.

SAC - estas Scienc-Afera Centro de UEA en Budapeŝto, kies grava agadtereno estas eldonado de fakliteraturo. Laŭ Budapeŝta Informilo /BI/ en kelkaj monatoj estos prespretaj verkoj "Ĉu vi konas la Teron?" de E. Dudich, "Kompendio de la organika kemio" de I. Gál, "Naturscienca Poŝenciklopedio", "Sciencaj Komunikadoj" kaj "Navigacia Regularo". SAC serĉas sciencajn kaj teknikajn verkojn, ĉu originalajn, ĉu tradukitajn, ĉu tradukotajn por eldono dum la sekvantaj 5 jaroj.

Preparataj publikaĵoj de STS-ĈEA:

Jan Rybář: Terminaro de hidraulaj meĥanismoj /E, A, Ĉ, F, G, R/ kun difinoj en Esperanto. La manuskripto prespretigis ing. J. Werner. Ĝi aperos en ĈEA 1982.
Stanislav Kamarýt: Historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio. Redaktis ing. J. Werner /membroj de la redakcia kolektivo: J. Mařík, Z. Hrášl/. La manuskripto, jam transdonita al ĈEA, aperos en 1982.

el leterkesto

/El unu letero.../

Hilversum 13.12.'81

Estimataj sinjoroj!

Kiel sekretariino de la Faulhaber-Fondaĵo mi sentas bezonon skribi al vi pri la bonegaj prezentaĵoj en la lando de la ĉefa aktorino Eva Seemannová el Prago. En "La : Vuursche" en salono kun 90 esperantistoj Eva prezentis por ni poeziajn partojn de Frána Šrámek, Ant. Sova, J.V. Sládek, Eli Urbanová kaj Karel Čapek.

Ni tre ĝojas ekkoni gravan parton pri la poezio kaj prozo el via lando.

La sekvontan tagon ŝi prezentis por ni la originale en Esperanto verkitan unuaktaĵon de la ĉefa reĝisoro Valdemar Vinař "Ĉerande de l' abismo"...

Ankaŭ en aliaj urboj en Nederlando, en Almelo, Utrecht, Den Haag kaj Amsterdam Eva prezentis la teatraĵon "Ĉerande de l' abismo" kaj sileziajn fabelojn kaj rakontojn en silezia popolkostumo. Mi nur aŭdis laŭdojn.

Do, per Esperanto via kulturo trairas la mondon. Mi tre ĝojas ekkoni Eva, ni bonege interkompreniĝis.

Por fini, korajn salutojn el Nederlando kaj de la nederlandaj esperantistoj.

Mies Deg


Estimata sinjoro Kořínek, fine oni forigis de mia mano la gipsbandaĝon kaj mi povas al vi skribi, kaj danki por la granda ĝojigo, kiun vi al mi kaŭzis. Niaj gastoj kune kun mi admiris la Esperantan libreton, kiu venis pere de vi de tiom malproksime, el Brazilo. Ĝis kien povis mia malgranda rakonto alporti sciigon pri montoj en nia lando, pri moroj de nia regiono. Tio estas al mi tre agrabla kaj ĝojiga. Mi estas al vi tre dankema por la atento al mia laboro. Daŭre mi havas do etan esperon, ke foje povus mia tuta - de vi tradukita - libreto disflugi en la mondon sur flugiloj de Esperanto? Eĉ se tio estas espero negranda, ĝi estas tamen varmiga. Mi dankas al vi pro ĉio.

Mi sendas al vi ĝmenau ankoraŭ unu el miaj libroj - la solan, kiun mi ankoraŭ en kelkaj ekzempleroj havas, ĉiuj ceteraj 13 estas tute disvenditaj. Tio ĉi estas elekto, en kiu vi trovos ankaŭ kelkajn rakontojn, kiujn vi jam tradukis. Kaj kune kun la libreto mi sendas al vi dezirojn de agrabla Kristnasko kaj deziron de bona kaj sukcesplena jaro 1982. Estu sana!

Kun kora saluto

Marie Podešvová p.m.

/La verkistino vivanta en la montaro
Bezkydy festis antaŭ nelonge sian okdekjariĝon./



ni recenzas

GRANDA INSTRUISTO DE LA NACIOJ, verkis originale en Esperanto H. K. Bouška, Portugala Eldona Rondo, Porto 1981, 45paga, broŝurita.

Sub la titolo surprizas la mencio "verkita originale de", ĉar faktoj, kiujn la libreto enhavas, estas neniam "originalaj". Pli taugaj estus esprimoj "kompilis kaj esperantigis" aŭ simile.

La libreto estas modele kompilita. La enkonduko de aŭtoro montras lian profundan intereson pri la temo, kvankam lia frazaro iomete longas kaj abunde uzas ekspresivan frazeologion.

Sekvas bonstile reproduktita biografio kaj informoj pri verkaro de Komenio; ĉapitro dediĉita al internacia lingvo ankaŭ enhavas konatajn, lerte klarigitajn faktojn. Nur estus pli oportune - se oni jam citas nomojn kaj precizajn datojn de eldonoj -, citi ankaŭ tutajn titolnomojn ekz. "Linguarum methodus novissima" anstataŭ nura "Linguarum methodus", aŭ "De rerum humanarum emendatione consultatio catholica" anstataŭ unuaj tri vortoj.

La verko kiel tuto estas valora konciza informo pri Komenio, nur estas domaĝo, ke ĝia grafika aspekto ne estas bona kaj ke la teksto enhavas gravajn preserarojn.

dr. Barandovská

Ivan Andrejeviĉ Krilov /1769-1844/: 111 fabeloj. Tradukis Sergej Rublov. Eldonita okaze de la Internacia Jaro de la Infano 1979 far Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto. Respondeca eldonanto: Tibor Vasko. Respondeca redaktoro: Vilmos Benczik. La kovrilo kaj grafikajoj de László Kertész. Paĝoj 138, formato 18 x 12,5 cm, kartonita, prezo ne indikita.

La klasika rusa fablisto prezentas sin al ni en 111 fabeloj en adekvate bonaj tradukoj de S. Rublov kiel inda samkampa verkisto kun la famaj fablistoj Ezopo, Fedro, LaFonteno kaj rememorigas pri la Ezopa Sago de K. Kalocsay. Kelkaj fabeloj estas revesitaj epigonaĵoj, sed la plejparto estas tute originalaj freŝideaj fabeloj, kiuj en la rusa distingiĝas per memstara stilo kaj lingvo belsona kaj riĉa je popolaj parolturnoj. Krilov scipovas en satira vesto kaj poezie taŭga aspekto antaŭmeti spegulon al homaj malvirtoj, malkutimoj kaj fimoraĵoj, precipe de la epoko, en kiu li vivis.

Prijuĝi la fidelecon de la traduko mi ne estas kompetenta ne konante la originalon. La tradukinto, laŭ sia konfeso en la postparolo, klopodis konservi la belojn de la originalo modifante tiucele la metron de pluraj poëmfabeloj kaj uzante pli-malpli da libero en la tradukado, por konservi ĉefe la etoson de la originalo, la lingvan belecon kaj laŭeble la rimarkindan sonritmon de la originalo. Mi opinias, ke tion li sukcesas ĉe la plejparto.

de la poemoj. Nur ie-tie impresas la verso iom perfortita aŭ neklara. Rublov surprizas nin tre ofte per sagaca inventivo en freŝaj taugaj rimoj kaj versfarista lerto. En siaj 15 punktoj de la postparolo li deklaras principojn, kiuj lin gvidis ĉe la ampleksa traduklaboro.

Gravan kaj aprezendan artisme pretendan laboron al la Esperanta publiko liveris S. Rublov konigante nin kun la rusa majstro. La libreto kun nemultaj preseraroj prezentas valoran riĉigon por nia literaturo, ĝi estas bone uzebla en la kursoj kaj en junularaj recittrondoj. Ni povas ĝin varma rekomendi.

La libron eblas mendi ĉe ĈEA.

Jiří Kořínek



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagas 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

S-ino Safia Rashid, Block No-3 B-20 Gulshan Iqbal - KARACHI /Pakistano/deziras korespondi.

Membroj de Esperanto klubo Voronež-centr. a/k 5 SSSR 394 000 deziras korespondi kun esper. el la ĝemelurbo Brno!

Darius Vaičiulis /12-j. knabo/ Blindžius g. 24-2 SU 232004 Vilnius, Litovio, USSR.

Darius Lasionis /14-j. knabo/ Raud. Armijos pr. 42-46 SU 232015 Vilnius, Litovio USSR

Darius Bilotas /14-j. knabo/ Konarskio 22 D-2 SU 232 15 Vilnius, Litovio USSR

Ekonomo-ing. 33-jara: Pranat Boris, str. Eremejeva 27, 1.25 Sovetunio, 394026 VORONEJ 26 pri E-movado.

Sovetunio, SU-252035 KIEV-35 ul. Kudrjaŝova 12, ŝkola 221 interklubo Pogorelaĵa Svetlana

Sovetunio, SU 252099 KIEV -99 ul. Rosijskaja ŝkola 160, interklubo - kun membroj de IAMIK.

23j. fraŭlo-literaturo, poezio, lingvoj, vojaĝ., mondpaco, bildkartoj: Karimierz Dobrowski, ul. Korańska 1/226 PL 52-121 WROSLAW, Pollando.

14jaraĝa knabino deziras korespondi pri naturo, historio, turismo: LENKA MASARIKOVÁ, CS - 788 11 LOUČNÁ n/D. n-ro 77.

Mi aĉetos grandajn vortarojn de Filip: ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-ĉeĥa. Ofertojn al: Vladimír Rotrekl, 66902 ZNOJMO-Dobšice 297.

KRONIKO

Honorigo de Zbyněk Jonáš
pruvas, ke la esperantistoj
neniam preterlasas profiton
de nia socio.

Post la unua portanto de la
ora medalo de Janský por pli
ol 40 senpagaj sangodonacoj
Jiří Zindulka el Sebranice
apud Litomyšl kaj de la dua
MUDr Jiří Vandas el Čížová,
distr. Písek, atingis tiun
plej altan honorigon ankaŭ
la estro de EG en Mladá Bo-
leslav Zbyněk Jonáš. Li ak-
ceptu niajn plej korajn bon-
dezirojn! Se vi scias pri plu-
aj honorigitoj /ankaŭ de la
arg. kaj bronza med./ skribu
al D-ro Josef Hradil, 295 ol
Mnichovo Hradiště.

Jiří Munzar, 32-jara, su-
bite mortis 23.12.'81. Esperan-
tisto ek de j.'73 lastatempe
vivinta en sociala instituto
en Hrabyně. Ni ne forgesu lian
entuziasmon.

František Hruška el Ústí
n.L. forpasis subite 15.1.1982
en aĝo de 75 jaroj.

Bohuslav Novotný el Hlu-
šovice en sia 70a vivjaro for-
lasis niajn vicojn 17.1.1982.

La forpasintoj sincere disvas-
tigadis la pacideojn pere de
Esperanto kaj meritas nian
daŭran dankemon!

Vladimír Slaný - 75 jaraĝa.

E-o moveĉo en la Nordmorevia
regiono estas nedisigibla kun
la s-ano Slaný. Li naskiĝis en
Klimkovic 1.2.1907, poste li
feriĝis instruisto, kiu baldaŭ
konatiĝis kun Esperanto, kaj fa-
riĝis ĝis ŝtate ekzamenita in-
struisto.

Ekde tiem li aktivis kiel funkci-
ulo de lokaj grupoj de esperantis-
toj, kiel regiona gvidanto de E-mo-
vado en norda Moravio. Dum la ja-
roj 1945-1950 li estis Esperanta
peroledisto en radio Ostrava. Tre
meritplena estas lia agado kiel
instruisto de Esperanto.

Okeze de grava vivjubileo ni sendas
al s-ano Slaný sincerajn bondezi-
rojn kaj dankon por la farita labo-
ro.

V. Novobilský

STARTO - neprevidebln vĉstník Ĉeského esperantského svazu.
Jilská 10. 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu.
Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr. Jaro-
mír Jermář CSC a Zdenko Krámský, Kresby Pavel Rak, grafická
úprava Milen Lebašta. Tisk zajišťuje Technické ústředí kni-
hoven Praha. Předáno do tisku 1.2.1982. Dohledací pošta Praha
07, snížený poplatek za poštovné povolen ředitelstvím pošt
Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, ĈS- 110 00 Praha 1.
Aperas 6 foje jare, jarabono 24,- Kčs au 10,50 gld. Jarabonojn
akceptas niaj perantoj kaj UEA same kiel kotizeojn por anoncojn.

Navštivte prodejny
výrobního družstva
INKLEMO PRAHA,


kde nakoupíte vhodné bytové doplňky:

- koupelnové skřínky dvoudílné,
dl. 550 mm, v. 375 mm, hl. 105 mm,
dvoji zrcadlová dvířka cena 235,00 Kčs
- koupelnové skřínky třídílné
dl. 815 mm, v. 375 mm, hl. 105 mm,
troje zrcadlová dvířka cena 290,00 Kčs
- skřínky na obuv vysoké,
dl. 550 mm, v. 1020 mm, hl. 350 mm cena 375,00 Kčs

Všechny skřínky jsou kovové v pastelových barvách.
Výrobky neposíláme na dobírku.

Rádi Vám je předvedou v prodejnách v.d. INKLEMO
Praha:

Skořepka 8	Praha 1, tel. 266824
Bělehradská 128	Praha 2, tel. 229531
Kafkova 22	Praha 6, tel. 341576
Dukelských hrdinů 4	Praha 7, tel. 370035



**POR MODERNA SOMERA
VESTIÇO DOMO DE MODO**

Dummi
BRATISLAVA



POR VIA KOMFORTO UTILIGU
ALSENDAN SERVONI!